

Ŝtatbuĝeto 2007a: buĝeto por mortigi

Kontraŭmilitista Alternativo - MOC

Obsevante la hispanan ŝtatbuĝeton por la jaro 2007a, ni vidas buĝeton, kiu, alivestita kvazaŭ progresema propono, montras al ni la mortvizaĝon sub formo de militista elspezo.

Anstataŭ fari ĝin objekto de publika debato, denove la ŝtatgvidantoj uzurpas al la civila socio la povon decidi, kion oni faras per ties mono. Tio estas nenio krom la sekvo el la impono de determinita defendmodelo, kiu, laŭ ili, estas nekontestebla. Kiel kontraŭmilitistoj, nia kontesto kaj denonco al la armeoj komencas per la denonco al la militpretigo.

La maskitaj donitaĵoj

La Ĝenerala Ŝtatbuĝeto por la 2007a asignas por la militista defendo 23.052 milionojn da eŭroj, kio samvaloras pli ol 3,7 bilionojn da pesetoj (kun "B" de bombo).

Kiel kutime, la asignosumo por la Defendadministrado estas iom pli ol la triono de tiu kvanto: oni devas noti ankaŭ la pasivajn klasojn, la memstarajn instituciojn de la Defendadministrado enmetatajn en la asignoj por la Ministerioj pri Industrio, Komercado kaj Turismo.

La fakto, ke la registaro kaŝas la militistan elspezon, elmontras la malutilecon de tio, kion ĝi volas kaŝi.

Milito ne estas neevitebla. La armeoj ne estas bezonaj

Malgraŭ tio, kion oni diras al ni, ni scias, ke la milito ne estas neevitebla. Fore el konsisti en fatalaĵo de la destino aŭ burĝoni neatendite kiel sovaĝaj fragoj, la militoj estas politikaj decidoj, kies kaŭzojn oni devas serĉi en la ekonomiaj



interrezoj de la enriĉigitaj landoj, kiujn ni vidis sendi hipokrite la blu-kaskulojn kiel aŭtentikan fajrestintistojn-fajrmaniulojn. Ni plendas pro la perdialoga solvado de la konfliktoj kaj la abolicio de la armeoj.

Alvoko al la saĝo:

alvoko al malobeado

Ekde la Kontraŭmilitista Alternativo-MOC, ni faras alvokon al la saĝo kaj al la malobeado por fini la militistan frenezon ekde ties ĝermo mem: ni evitu la pretigadon de la milito. Ni daŭrigos ankaŭ postulante, ke la militistajn instalaĵojn oni igu instalaĵoj por sociaj celoj. Ni urĝas la civilan socion fari fiskan objetadon al la pormilitistaj elspezoj, kiel faras miloj da fiskaj geobjektantoj, kiuj rifuzas pagi impostojn por la milito. Ni postulas, ke la 23.052 milionoj da militista elspezo igu 23.052 milionoj da prosocia elspezo. La nursola kiel fini elradike la militon estas fini ties pretigadon. Por ni estas sunklare: se volas pacon, pretigu pacon.

Iuj apartaĵoj de la ŝtatbuĝeto

1. La militista elspezo atingas 2,9% de la Ena Malneta Produkto kaj 12,6% de la Ĝenerala Ŝtatbuĝeto.
2. 1.586 milionojn da eŭroj oni asignas al Serĉado kaj Disvolvado de pormilitistaj materialoj; el tiuj 1.225 estas kaŝataj en asignoj al la Priindustria Ministerio.
3. La poreventualeca fonduso por financi militistajn komisionojn eksterlande estas kaŝata en la asignoj al la Fiska Ministerio, kaj oni taksas ĝin je 566 milionoj da eŭroj.

Elĉerpaĵo el *Catalunya* (Katalunio) esprimorgano de la Ĝenerala Laborista Konfederacio de Katalunio (CGT) numero 83, februaro 2007a. Esperantigita de Jurgo Alkasaro
